

Make Money By Helping Esperanto!

You can get 33½ per cent return on your investment, as soon as you choose to do so, by just spare time recreation.

This Is The Way:

Buy four "sub-cards," for a total outlay of three dollars. Sell these cards at once to friends, neighbors, acquaintances and strangers, for a dollar apiece.

You get four dollars for the three you spent!

USE THIS FORM

American Esperantist Co.,
Washington, D. C.

I want four sub-cards. I enclose

\$3.00.

Put name	and addre	ss here.	



AS A MATTER OF FACT:

The excellence of your magazine, the extent of its power to promote the Esperanto Movement, its value to advertisers who are testing Esperanto as an advertising medium, and lastly the attitude of the world in general toward Esperanto and toward YOU as an Esperantist,—all this depends upon the rate at which

THE SUBSCRIPTION LIST GROWS EACH MONTH.

The American Esperanto Book

Standard Edition, cloth bound, postpaid for \$1.00 With new subscription to Amerika Esperantisto, \$1.50

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, Washington, D. C.

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter January 11, 1911, at the Postoffice at Washington, D. C., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

Maryland Building, Washington, D. C.

ONE DOLLAR A YEAR

Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50)

SINGLE COPY TEN CENTS

Vol. 12

JANUARY, 1913

No. 6

Esperanto Used at Oxford

The Oxford Committee for Promoting International Understanding and Friendship (55 St. Giles, Oxford, England) has promulgated the following letter and resolution, in English, with Latin and Esperanto translations:

Novembro, 1912a.

Sinjoroj,

Mi havas la honoron sendi la ĉi kunan Rezolucion, kiu estas aprobita unuanime ĉe kunveno okazigita de la supre skribita komitato je la 29a de oktobro en Kolegio Manĉestera, Oksfordo.

D-ro Gilbert Murray (Rega Profesora Greka) prezidis, kaj la Rezolucio estis proponita de D-ro Estlin Carpenter (Estro de Kolegio Manĉestera), subtenita de D-ro Scott Holland (Kanono de Christ Church kaj Reĝa Profesoro Teologia), kaj porparolita de S-ro Sidney Ball, Magistro (Fratulo kaj Tutoro de Kolegio Sankt-Johana).

Mi restas

Via obeanta J. Theodore Dodd REZOLUCIO, Kolegio Manĉestera, la 29an de okt. 1912a

Ke tiu ĉi kunveno vidas en la internacia karaktero de universitata lernado. kaj en la libereco de alproksimiĝo por studentoj el ĉiuj rasoj al universitata instruado gravajn helpilojn por kreskigi internacian amikecon; kaj ordonas sian Honoran Sekretarion, ke li sendu ĝian fratan saluton al la Universitatoj alilandaj, kaj al la diversaj federacioj de universitataj studentoj.

That a body in an English university should use English as the first language in which to couch a resolution is natural and proper. That next after its national tongue it should place a translation in Latin is almost equally to be expected, since Latin reached a quasi-international position among men of learning in the middle ages, and has remained such for university use to this day, not only in the wording and conferring of diplomas but in certain other uses.

That in addition to this a translation in Esperanto should be appended is a most gratifying proof of the high opinion in which Esperanto is held by even the most conservative persons who take the pains to investigate its character, its present status and its possibilities; it is furthermore a very gratifying proof to all of us who are working for the promotion of Esperanto, that the patient, steady and loyal effort of the Esperantists attains its reward in the results gradually achieved, in the appreciation increasingly received by Esperanto, and in the practical use increasingly made of this notable contribution to the progress of civilization.

For the copy of the Esperanto version

of the letter and resolution given above our thanks are due to President David Starr Jordan, of the Leland Stanford University (California), and to Prof. A. L. Guerard, professor of Romanic languages in the same university.

Kroniko Nordamerika

BOSTON, MASS.—La Bostona Esperanta Societo proponas lui dometon por la venonta somero je iu marborda urbeto, ĉe kiu la novanglaj Esperantistoj kaj vizitantaj samideanoj laŭvole povas loĝi dum nokto, semajno, aŭ pli longa tempo, kaj kie trapasantaj vizitantoj povas havi almenaŭ unu manĝon kun samideanoj. Ni esperas ke ĉiu novangla samideano, kiu aprobas, malaprobas, aŭ deziras fari aldonan proponon, tuj skribos al nia prezidanto, S-ro G. W. Lee, 147 Milk St., Boston.

FRAMINGHAM, MASS.—Laŭ raporto en la *Evening News*, S-ino Lillian Fuller paroladis pri Esperanto al tre atenta aŭdantaro ĉe la Virina Klubo,

kaj oni intencas starigi grupon

NEW YORK, N. Y.—En ĉi tiu urbo S-ro Klajin, kiu estas inter la plej fervoraj propagandistoj, jam povas kalkuli pli ol tridek Esperantistojn, kiujn li mem varbis al la afero, instruis en la lingvo, kaj interesigis je la organizata laborado

de la Esperantistoj.

PHILADELPHIA, PA.—Ĉe ambau kursoj por komencantoj, kiuj jam estas anoncitaj en Amerika Esperantisto, P-ro Hetzel, de la West Philadelphia High School, paroladis pri la Kongreso de Krakovo kaj pri sia uzado de la internacia lingi tra Eŭropo. Tia parolado je la komenciĝo de kurso bone entuziasmigas la lernontojn.

GAINESVILLE, FLA.—Laŭ artikolo en la Weekly Herald, la Southland Seminary havos kurson en Esperanto, in-

struatan de E-ino E. E. Owens.

WASHINGTON, D. C.—La Internacia Klubo havis la plezuron gastigi dum antaŭnelonga kunveno japanan Esperantiston, S-ron W. Oishi el Tokio, scienciston kiu vizitis Washington kelkajn tagojn por sciencaj celoj. Ĉiu multe ĝuis lian ĉeeston, kaj la mallongan paroladon kiun li donis. La klubo ankaŭ plezure havas kiel gaston dum la nuna monato S-ron F. B. Headley, scienciston

el Nevada, kiu estas entuziasma Esperantisto.

BALTIMORE, MD.—Ĉe la tre grava misiista kunveno nomita "la mondo en Baltimore," kiu okazis antaŭ nelonge ĉi tie, S-ino Wilbur F. Crafts paroladis dufoje pri Esperanto kaj multe interesis la aŭdantarojn pri sia temo. Pastro James L. Smiley ankaŭ faris iom da propagando por Esperanto ĉe la sama kunveno.

MOBILE, ALA.—En la Mobile Item antaŭ iom da tempo aperis longa artikolo pri Esperanto, instigita de S-ro A. S. Mellichamp el Agricola, Miss.

TRYON, N. C.—En la Tryon Bee aperis mallonga raporto pri parolado kiun D-ro H. J. Garrigues donis pri Es-

peranto al invititaj gastoj.

DETROIT, MICH.—D-ro Tobias Sigel paroladis pri Esperanto ĉe la Witenagemote Klubo, kaj poste respondis al multaj demandoj pri sia temo. La sekretario de la Esperantista Klubo, S-ro Scwarzenzer, estris bonan ekspozicion da libroj, gazetoj, k. t. p., kaj per tio bone helpis entuziasmigi la aŭskultintojn.

CHICAGO, ILL.—La konsilantaro de la bohema filio de la Gradata Societo havis sian jaran kunvenon en la klub-cambro ce West Park Klubdomo, en Novembro. La bohema filio havas jam tridek anojn, kaj elektis la jenajn ofiicistojn por la nuna jaro: prezidanton, D-ro R. K. Ŝimonek; vicprezidanton, Joseph Miroŝovsky; sekretarion, Charles Krabec; kasiston, Joseph Pohanka; financan sekretarion, James Pour. La korespondanto al Amerika Esperantisto estas S-ro James B. Rezny.

La klubo kunvenas ĉiudusemajne, kaj havas tre interesajn progamojn; baldaŭ ĝi prezentos Esperantan teatraĵon.

ROSS, IOWA.—S-ro J. L. Rutherford redaktas Esperantan fakon por kelkaj filatelaj ĵurnaloj. inter kiuj estas la *Philatelic West* (Neb.), kaj la *Idaho* Postcard Exchange (Idaho), Jen bona ekzemplo al Esperantistoj: verku multajn mallongajn artikoletojn pri Esperanto por ĵurnaloj de via propra intereso aŭ profesio, kaj tiamaniere helpu kaj la ĵurnalojn kaj la internacian lingvon!

PLAINVIEW, NEB.—En la Plainview Republican aperis dukolona artikolo pri Esperanto, verkita de S-ro P. H.

Petersen.

TACOMA, WASH.—La Tacoma News kaj la Ledger presigis longajn artikolojn pri Esperanto antaŭ nelonge. Alia nova grupo estas starigita ĉi tie.

McMINNVILLE, ORE.—La News-Reporter anoncas ke la estro de la lokaj lernejoj, helpate de aliaj Esperantistoj, faras aranĝon por ke ĉiu infano en la lernejoj povu komenci Esperantan korespondadon per poŝtkartoj kun infanoj alilandaj.

LAKEPORT, CAL.—Laŭ anoncoj en la Lake County Bee, ĉiusemajna kurso en Esperanto nun kunvenas, ĵaŭde je 7:30, sur la unua etaĝo de la Farmers National Bank. D-ro Wm. R. Lane

prezidas, kaj D-ro W. H. Fearn gvidas la kurson.

SAN JOSE, CAL.—En la jurnalo Mercury aperis longa artikolo pri Esperanto, verkita de S-ro J. S. Horn el Agnew, Calif., kiu deziras starigi grupon.

OAKLAND, CAL.—La loka grupo estas nun organizita kiel filio de la E. A. de N. A. S-ro J. B. Wallace estas prezidanto kaj S-ro M. S. Gill estas sekretario (adresu: 1907 Myrtle St.).

EL KUBO

La Kuba "Ruga Kruco" decidis, dank' al klopodoj de D-ro Sanchez Fuentes, oficiale malfermi por siaj anoj Esperantan kurson gvidatan de nia senlaca samideano D-ro Aleman Ruiz.

Bohemia, tre grava ĉiusemajna revuo, publikigas Esperante artikolojn kaj malfermis kurson por siaj abonantoj, ankaŭ

gvidatan de D-ro Aleman.

En Santa Clara S-ro Rafael G. Crespo paroladis pri Esperanto antaŭ instruista kunveno.

> RAFAEL G. CRESPO, Baez, Kubo.

El Katalunujo

inter la katalunaj Esperantistoj por la IVa Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio, kiu okazos en majo kaj promesas esti sukcesplena, kiel la antaŭa. La komitato de la "Floraj Ludoj" pretigas jam la alvokon al la IIIa festo. Tiu komitato konsistas el la jenaj sinjoroj: Carlo Bourlet, Jozefo Grau, F. de Menil, Gabriel Chavet, J. Garganta, kaj Pastro Coll.

Oni donacos premion al du prozaĵoj kaj al du versaĵoj, originalaj kaj tradukitaj. La aŭtoro de la plej bona el tiuj premiitaj verkoj havos la rajton elekti la Reĝinon de la Festo. Aliaj personoj kaj grupoj donacis apartajn premiojn kaj proponis specialaj temojn, ekzemple La Revuo, kiu donacas 50 kaj 30 frankojn da libroj al la aŭtoro de la plej bona biografio pri artisto. La legantoj, kiuj deziras pluajn detalojn povos renkonti ilin en la Kataluna Esperantisto kaj La Revuo.

La proksimeco de Ĝenovo vekis ĉe niaj samlandanoj grandan deziron ĉeesti la IXan Kongreson. Multaj Esperantistoj jam sin turnis al la estraro de la Federacio petante ke ĝi organizu karavanon kaj speciale frajtu ŝipon, kredante ke ĝin profitos eĉ multaj neesperantistoj, kiuj tiamaniere povos esti allogitaj al nia afero. La demando estas studata kaj oni esperas ke ĉu per tiu ĉu per alia rimedo multaj katalunoj ĉeestos la Kongreson.

Mi scias, ke inter la estroj de nia enlanda movado multe diskutiĝis la demando pri kaj pro la balkana milito. Kion fari, kiel agi, por montri al niaj samideanoj el tiuj batalantaj popoloj nian ĉagrenon kaj nian simpation al ĉiuj! Ho ve, kiom malproksima la paca tempo revata de nia Majstro! Kiom da vivoj falĉitaj! Sed ni ne senkuraĝiĝu! Ni ne laboras por hodiaŭ sed por morgaŭ!

Fred. Pujula,
Barcelono, Katalunujo.

Official Communications

Sub ĉi tiu rubriko la redaktoroj volonte presigos komunikaĵojn de ĉiu esperantista societo, kiu havas inter nia legantaro sufiĉe da anoj aŭ kies speciala fako de laboro interesos niajn abonantojn.

The Esperanto Association of North America

Central Office: Washington, D. C.

NECROLOGY

Esperantists are mourning the loss of two tireless workers for the Esperanto Movement. Dr. Leopold Elb, of Germany, member of the Lingva Komitato, writer and translator of many Esperanto works, propagandist and indefatigable worker, died suddenly, after but a brief illness. Dr. H. Dor, of France, first president of the physicians Esperanto association, and a prominent and helpful leader, full of energy in spite of his advanced age, passed away last month.

ANNOUNCEMENT OF MARRIAGE.

Miss Mabel Gochenauer, secretary of

the Los Angeles Esperanto Society, and Mr. Walter E. Smith, president of the Society, were recently married and are at home at 179 West 39th Street.

PASSED PRELIMINARY EXAM-INATION.

(Atesto pri Lernado) Oscar Baranda, St. Louis, Mo.

PASSED ADVANCED EXAMINA-TION.

(Atesto pri Kapableco)

Adolphus Mayer, Washington, D. C.

Students' Esperanto League

The Students' Esperanto League is a Sectional Federation of the E.A. of N.A. and is conducted by the students for the students. All pupils in high schools or institutions of similar rank, and those who have been members of such schools within five years, are urged to send 50 cents to the Sec'y S.E.L., the Esperanto office, Washington, D. C., for combined membership in S.E.L. and E.A. of N.A.

FOR YOUNG ESPERANTISTS' CLASSES

In every group of young Esperantists the members sometimes become tired of the constant study and it is often a difficult problem for the leaders to find something interesting without going beyond the knowledge of the beginners. Suggestions for these classes will appear from time to time in these columns. The game explained below has been tried out thoroughly and has proved unusually successful.

AN EASY ESPERANTO GAME

One game which can be played from the very first lesson is an adaptation of the old-fashioned spelling match. Two captains are chosen who, in turn, "choose sides." These stand or sit on opposite sides of the room and the game begins. The class leader calls out an English or Esperanto word, which the class has already had, and the first person on the first side must give the translation. If the correct answer is given the leader then asks the first member of the other side a question. This keeps up, alternating from one side of the room to the other until some one makes a mistake. If the class is a large one he must drop out of the game. The leader then asks the same question of the next player until someone gets it right; all those who miss it must drop out. The side which has a member up the longer wins and he is the "champion."

If the class is too small to keep the game up long in this way, it may be played indefinitely by scoring a mark against a side for each miss instead of having the misser drop out. When the game stops, the side with the least marks against it, of course, wins.

> SELANO, Washington, D. C.

KRONIKO DE STUDENTA ESPERANTISTA LIGO

CHICAGO, ILL.—La Zamenhof-Esperanto Rondo kiu enhavas anojn de la supraj lernejoj de Chicago petis sian rajtigilon kiel rondo de S. E. L.

HONEOYE FALLS, N. Y.—Oni anoncas ke oficiala Rondo estos starigata ĉi tie tuj post la Kristnaska libertempo.

Pro la klopodoj de Dudley C. Brooks, la Honeoye Falls Times presis bonegan dukolonan artikolon pri Esperanto sur la unua pago. Ankaŭ aperis en la sama ĵurnalo je alia dato bona anonco pri la S. E. L., kun la "Students' Editor Letter."

WASHINGTON, D. C.—Aperis en la Washington Star, la plej grava vespera ĵurnalo de Washington, duona kolono anoncanta novan kurson por junuloj gvidotan de Sro. Edw. L. Fuegel. La kurso nun bone progresas kaj la Washington'a Rondo intencas komencigi novajn kursojn la unuan sabaton de ĉiu monato.

Kiel rezulto de parolado donata de Sro. Edwin C. Reed antaŭ unu monato ce la Tehnika Supra Lernajo, grupo estis starigata inter la studentoj de tiu lernejo. Ĝi jam havas pli ol dekduo da anoj kaj

baldaŭ fariĝos Rondo.

F-ino Helen Rankin verkis bonegan artikolon pri Esperanto, kiu aperis en la Easterner de Eastern' lernejo. Ankaŭ bona artikolo pri S. E. L. aperis en la Balance Sheet, gazeto de la Komerca

Supralernejo.

ALILOKE. — Kelkaj aliaj gazetoj presas la Students' Editor Letter, kaj ĉiuj niaj anoj bone laboras por la afero. Kion vi faras por helpi la movadon inter studentoj? Sendu al ni kronikon el via urbo!

T. E. K. A.

(TUTMONDA ESPERANTISTA KURACISTA ASOCIO)

Ci tiu profesia asocio jam travivis kvin malfacilaĵoj kaj malhelpoj. Dank' al la sindona kaj senĉesa laborado de siaj oficistoj, ĝi nun sin trovas sur fortika bazo kaj meritas la subtenon de ĉiu Es-

perantista kuraciston.

Ĝi regule eldonas ĉiumonatan ĵurnalon Kuracisto, (vidu alie en AMERIKA ESPER-ANTISTO), tre unikan kaj gravan ĵurnalon medicinan. Tiu eldonaĵo havas multajn kunlaborantojn el ĉiuj landoj, kaj prezentas revuon de medicina progreso tra la mondo, kiu ne povas esti trovata en iu nacilingva ĵurnalo. La kotizaĵo de T E. K. A. estas nur Sm. 2, kiu enhavas abonon al Kuracisto.

Estas notinde ke tra la tuta mondo la jarojn plenajn je preskaŭ nesupereblaj kuracisto de la komenco ludas gravan rolon en la propagando kaj administrado de Esperanto. Estas espereble ke ĉiu Esperantista kuracisto en Usono kaj Kanado donos sian helpon kaj subtenon al T. E. K. A., kaj aniĝante kaj sendante al la usona kunlaboranto tiajn sciigojn, kiaj havas internacian intereson. Sendu kotizaĵon rekte al Varsovio aŭ per la subskribita usona korespondanto.

> Por pli detalaj informoj turnu al D-RO C. H. FESSENDEN,

> > Newton Centre, Mass., Usona Kunlaboranto.

Universala Esperanto-Asocio

Dum 1913 UIA kalkulis 470 membrojn dissemitajn en 23 landoj. Tiu sukceso, kiu superis niajn esperojn, montras, ke la kreo de Interŝanĝa Fako respondis veran bezonon ĉe la Esperantistaro.

Por respondi diversajn dezirojn ni informas niajn legantojn, ke dum 1913 la INTERSANGA BULTENO regule aperos ĉiudumonate, de la Ia de januaro. Tiamaniere ĝi fariĝos vera gazeto utila al

kolektistoj kaj kapabla liveri al ili prak-

tikajn informojn.

Ni rememorigas al ĉiuj niaj membroj, ke la kotizaĵo por 1913 estas de nun repagebla. Sekve de la ĝenerala voĉdonado de la Delegitoj de UEA pri la financa reformo de UEA, la kolizaĵo al UEA estis fiksita je 1 Sm. La kotizaĵo al la Interŝanĝa Fako restas kiel antaŭe 50 sd. Konsekvence ĉiu membro de UIA devos pagi entute kotizaĵon da 1,50 Sm. (por aliĝo al UEA kaj UIA). Oni estas petata ĝin repagi kiel eble plej baldaŭ al la Delegitoj de UEA, aŭ se ne estas al la Centra Oficejo de UEA. Ĉiu membro repaginta ricevos membrokarton por la nova jaro. Li konservos sian ĝisnunan membran numeron. La adresoj de ĉiuj membroj repagintaj aperos en la venonta Bulteno.

Ni esperas, ke ĉiuj niaj membroj restos al ni fidelaj por la nova jaro kaj per sia persona agado helpos al la pligrandigo de nia Fako, kies sukceso samtempe signifas gravan progreson por Esperanto.

Regionaj kunvenoj.—Laŭ la Statuto, tiuj kunvenoj devas okazi en ĉiuj regionoj kie estas almenaŭ 20 Esperantianoj. Ili estu organizataj prefere en monato oktobro aŭ novembro.

Pri la tagordo de tiuj kunvenoj ni petas atenti pri la jenaj rimarkoj:

A. La Delegito unue faru sian ra-

porton. Tiu raporto resume traktos pri la nuna stato de U. E. A. kaj la financa reformo. Ĝi poste estos dediĉata al la regiona agado.

B. La kunveno diskutos la konkludojn de la raporto, kaj esprimos pri ĝi sian aprobon aŭ neaprobon.

C. Ĝi poste diskutos kaj interŝanĝos ideojn pri la regiona agado de U. E. A. dum 1912. Ĉiuj membroj rajtas fari proponojn. La deziresprimoj rezultantaj el la diskutado estos enregistrigataj en la protokolo, kaj servos kiel bazo por la agado de la Delegito kaj liaj helpantoj.

D. La Delegito uzu la okazon por repagigi la diversajn kotizaĵojn kaj propagandi por U. E. A.

E. Ĉe la regionaj kunvenoj, ankaŭ nemembroj povas esti enlasataj, sed nur la membroj rajtas partopreni en la diskutoj kaj voĉdoni.

Tabelo de la Kotizaĵoj

	Sumo sendota al la Centra			
Kategoria	Kotizaĵo		kaso	
Membro			-0.0	
Faka kotizaĵo		0.50		0.50
Subtenanto		2		2.—
Esperantia Entrepreno .	- "	5		1
Esperantia Entrepreno_ (Esperantista organizaĵo	- "	3.—	" 2	2.40
Dumviva membro (1 parto de la garant	- 44	50.— apitalo)),—

Kuracisto

ITH pleasure we call the attention of all Esperantists, and especially of physicians, to the new magazine Kuracisto, which has been established now as the official organ of the Esperantist physicians of the world.

We urge you all to show a copy of this to a medical friend or neighbor, pointing out to him the advisability of subscribing and of learning enough of the language to be able to read some of it each month. It goes without saying that every physician who is already an Esperantist will subscribe promptly, for a reliable medical magazine in Esperanto is one of the things which will make the International Language of inestimable value to the

profession. The new magazine starts modestly with a sixteen-page number (large pages), and gives every sign of being very successful and important. The editor-in-chief is Dr. Ludwik Chybczynski, of Warsaw,—whose very name is such as to impress upon the non-Esperantist the necessity for an International Language.

Numbers one and two have already been published,—and you should start your subscription with the beginning, so we have some extra copies ready to

avoid delay.

The American Esperantist Company, Washington, D. C., will take subscriptions (at \$1.55 per year) or will send a sample copy for 15 cents.

The New Testament in Esperanto

HE translation of the New Testament, first seriously discussed and planned in 1907 at the Third International Esperanto Congress, later arranged for by the appointment of a special committee, has been most carefully and painstakingly accomplished, and the committee finally announced last August that the translation was completed. Even this final draft of the work was again subjected to minute and searching criticism, before publication was entered upon.

The Greek text chiefly used was Nestle's, and there was a general understanding that in doubtful cases the English Revised Version was to be followed. But some clauses which are omitted by

Nestle and placed in marginal notes appear in this version because they are most familiar to Christians, for example, in Luke ix, 54, 55, 56. In certain passages also the rendering of the Authorized Version has been chosen instead of

that of the Revised Version.

The chairman of the original committee on translation, who has labored with self-sacrificing care upon the work, is Rev. James Cyprian Rust, of Soham, England. The publication is done by the National Bible Society of Scotland and the British Foreign Bible Society in conjunction.

The book is finished at last, and off the press! Copies are already on the way to this country, and you can probably have them as soon as you read this.

MORE ESPERANTO IN "THE CAVALIER"

Another Esperanto story will appear in the magazine entitled The Cavalier on January 18th. The title of the story is "La Allogo de la Lavendaj Arboj,"-but get the magazine yourself and see who did it, and how interesting the story is. An English translation accompanies the Esperanto, so you are justified in urging all your friends to get this number, too.

Remember to send direct to "The Frank A. Munsey Publishing Co., 175 Fifth Ave., New York," for this copy of The Cavalier, and state that you wish it because of the Esperanto story. Do not just pick up a copy at the news stand,

and do not think you have done all that is needed if you merely call the attention of your fellow club-members to it and stop there! It is a matter of duty to the Esperanto Movement, and of courtesy to the Frank A. Munsey Publishing Company to show them that a wide public appreciate their use of Esperanto.

If the publishers of the magazine find it worth while, they intend to publish an Esperanto story once a week. So do your share in showing them it is worth while. Don't just talk about it to other Esperantists.

IMPORTANT INVENTION BY AN ESPERANTIST

Dr. W. O. Snelling, of Pittsburgh, recently in his work at the Government Experiment Station discovered a new liquid gas that it is said will revolutionize gas illuminating systems and will reduce the cost of lighting.—Leslie's Weekly.

Dr. Snelling is an earnest and proficient Esperantist, already well known among the Esperantistaro for his efforts in behalf of Esperanto in his own city, in articles on Esperanto in various scientific publications and before scientific bodies, and lately also for his substantial assistance in the work of bringing Esperanto favorably before the International Congress of Applied Chemistry, which met in New York and Washington a few months ago.

Humoraĵoj el German-amerikaj Gazetoj

ĈE LA HORLOĜISTO.

"Ĉu vi bonvolos rekomendi al mi vekigilon de iu nova sistemo, per kiu la servistino vekiĝas, ne perturbante la tutan

domanaron el dolĉa dormo?"

"Tiuspecan vekigilon, kian vi priskribis, mi ne havas, sed tiu ĉi vekigilo, kiun mi povas rekomendi al vi, estas laŭ la sistemo, ke la tuta domanaro vekiĝas, kaj la servistino dormadas plu, alispecon mi ne havas."

"Tute bone, mi acetas ĝin."

KIALO KAJ TIALO.

"Kio estas la kaŭzo, ke nia afabla najbaro, la sinjoro apotekisto, pasigas la noktojn sendorme?"

"Nu, li penadas elpensi tage kaj nokte

novan dormigilon."

TUTE SIMPLE.

"Mi certe ne povas kompreni kiama-

niere via amiko per sia malmultspesmila salajro sukcesas sin vivtenadi."

"Tute simple, karulino. Li vivas simple, li sin vestas simple, kaj li pagas simple—nenion!"

EN LA LERNEJO.

La temo en antropologio estis "La homa korpo." La instruisto vaste kaj detale estis priskribinta la diversajn partojn de la homa korpo kaj, ĉe la fino de la leciono, donis kiel hejmtaskon priskribi la homan spinon, diri ĉion, kion oni scias pri tiu ĉi grava parto de la homa anatomio, kaj esprimi la ideojn kiel eble plej klare kaj precize.

La eta Karlo, kiu, laŭ kutimo, ne estis estinta tre atentema, sed laŭnature iom spritema, alportis la sekvintan tagon la jenan priskribon: "La homa spino estas longa, ondforma ostaro, je kies unu ekstremaĵo sidas mia kapo kaj je kies

alia ekstremaĵo sidas mi mem."

Tradukis B. F. SCHUBERT.

Lerta Kato

LEKTRISTO, dezirante esplori la karakteron de kato, enŝlosis ĝin en ĉambro dum tuta tago, por ke ĝi fariĝu malsata. Dum tiu tempo la elektristo kunigis paron da elektraj dratoj al la elektraj lampaj dratoj; li enmetis elektrajn lampojn en la flurondon, tiamaniere ke la elektra fluo en ĉiu aparta drato devis flui tra elektra lampo, por eviti danĝeron de akcidento. Poste li kunigis la finon de unu drato al la zinko sur la planko sub la forno. La finon de la alia drato li enmetis en subtason plenan je lakto kaj fiŝo, kiujn katoj tre ŝatas manĝi.

Kiam ĉio estis preta la viro turnis la kunigilon kaj enlasis la elektran fluon, kiu ŝarĝis per elektro la zinkon kaj la subtason da lakto. Tiam li enlasis la katon.

A Clever Cat

N electrician, desiring to investigate the character of a cat, locked it up in a room the whole day long, in order to have it get hungry. During that time the electrician joined fast a pair of electric wires to the wires of the electric lights; he put electric lights into the current, in such a way that the electric fluid in each separate wire had to flow through an electric light, in order to avoid danger of an accident. Afterwards he fastened the end of one wire to the zinc on the floor under the stove. The end of the other wire he put into a saucer full of milk and fish, which cats very much like to eat.

When everything was ready the man turned the switch and let in the electric fluid which charged with electricity the zinc and the saucer full of milk.

Then he let in the cat.

Ĝi flaris la fiŝon kaj kuris ĉirkaŭ la ĉambro serĉante ĝin. Vidante la subtason sur la zinko, la kato rapidis al ĝi kaj metis la antaŭpiedojn sur la zinkon, kaj la nazon en la subtason. Tuj poste sekvis granda barakto de la kato, kiu laŭte ekkriis kaj miaŭis, saltegis, siblis kaj forkuris ĝis angulo de la ĉambro.

Baldaŭ la malsata kato malrapide revenis al la zinko, rigardis la manĝaĵon kaj esploris ĝin de diversaj direktoj. Fine starante sur la planko, tre proksime de la zinko sed ne tuŝante ĝin, la kato longe streĉis sian kolon kaj zorge komencis

manĝi.

Vidante kiel la kato venkis, la viro forpuŝis iomete la subtason de la rando de la zinko. Poste la kato denove penis atingi la manĝaĵon dum ĝi staris sur la planko, sed ne sukcesis. Tre zorge metante nun antaŭpiedon sur la zinkon, la kato palpetis la manĝaĵon per la nazo. Sentante iomete la elektron, ĝi detiris la nazon, sed ne forkuris.

Post momento la kato renversis sian antaŭan piedon genuflekse, tiamaniere ke la hararo sur la kruro, izolis la katon elektre de la zinko. Denove la kato komencis manĝi.

A. A. JENKINS.

It smelled the fish and ran around the room looking for it. Seeing the saucer on the zinc, the cat hastened toward it, and put its fore paws on the zinc, and its nose into the saucer. Immediately thereafter followed a great struggle on the part of the cat, which cried out loudly and mewed, jumped, hissed and ran away into a corner of the room.

Soon the hungry cat slowly returned to the zinc, looked at the food and examined it from various directions. Finally, standing on the floor, quite close to the zinc but without touching it, the cat stretched its neck away out and carefully

commenced to eat.

Seeing how the cat had won out, the man pushed the saucer a little way off from the edge of the zinc. Afterwards the cat again sought to reach the food while it was standing on the zinc, but did not succeed. Very carefully placing one fore paw upon the zinc, the cat felt the food with his nose. Feeling the electricity a little bit, it withdrew its nose, but did not run away.

In a moment the cat reversed its fore paw, bending the knee in such a way that the fur on its leg electrically isolated the cat from the zinc. Again the cat

began to eat.

VIZITO AL OKLAHOMO.

Kiam en la jaro 1900 mi vizitis Oklahomon la unuan fojon ĝi ne estis tiam ŝtato, ĝi estis teritorio. Tie estis multaj ruĝhaŭtuloj sovaĝaj, aŭ duonsovaĝaj, vestitaj en korpkovriloj, aŭ iafoje en la vestoj de la mirigaj blankhaŭtuloj. Tiuj ruĝhaŭtuloj estis bone nutritaj, grasaj kaj riĉaj.

Ankaŭ estis miloj da afrikanoj aŭ nigruloj, kiuj loĝis en malbonaj domoj el lignopecegoj, kaj estis tre malriĉaj. Ili loĝis proksime de la blankuloj, sed la ruĝhaŭtuloj preferis loĝi pli malproksime de la blankuloj, en la arbaroj. Tamen ne estis danĝere veturi tie.

La blankuloj tien iris por agioti aŭ spekulacii. Kelkaj estis forpelitoj, sed multaj estis koloniistoj, plejparte malriĉaj. La tero estis ruĝa sed riĉa, kaj produktis bonajn rikoltojn el tritiko, kotono, k. t. p. La tero estas ankaŭ

bona por produktado de multspecaj fruktoj, kiel pomoj, persikoj, ĉerizoj, fragoj kaj ĉiaj legomoj

fragoj, kaj ĉiaj legomoj.

La klimato estas pli varma ol malvarma. Varma vetero daŭras pli longe ol ĉiu alia sezono, kaj ofte estas tre varmege. Ruĝa pulvo flugas sur la vento kaj okaze vundas la okulojn. La aŭtuno estas tre bela kaj saniga; ĝia vetero estas malvarmeta kaj tre bela, kaj la noktoj estas agrablaj por dormi.

Kiam la vintro alvenas, estas malmulte da neĝo, kaj ofte tre multe da vento; iafoje dum tuta vintro estas tiel malmulte da frosto ke la kamparanoj povas plugi dum ĉiuj monatoj de la jaro. Post vintro venas somero; estas preskaŭ nenia printempo. Mi ne ŝatas tian klimaton, tamen ĝi ŝajnas ja saniga, ĉar la loĝantoj ĝenerale estas sanaj, viglaj kaj fortaj.

J. H. FAZEL.

La Unua Cigaro Kaj Jeremio

Fairfield's Akademio, miaj plej intimaj amikoj estis Henriko Borden kaj Filipo Webb. Ni studis kune, kaj promenadis kune, kaj kiam unufoje Henriko proponis al ni ke ni kune studu la misteron de tabakfumado, Filipo kaj mi estis samopiniaj.

"Vi vidas," diris Henriko, "mi tute ne aprobas la uzon de tabako. Ĝi estas kutimo tre malpura kaj malsaniga. Tamen juna viro devas scii pri tiaj aferoj, kaj almenaŭ lerni per sperto pri la fiziologiaj efektoj de cigaro, kiel parto

de sia edukiĝo."

"Tiel same mi pensas," diris Filipo.

